

NORDA FRANCIO, GASTAMA eĉ se NE FAMA

Renée Triolle Francio

https://eo.wikipedia.org/wiki/Ren%C3%A9_Triolle

Renée Triolle ★



Renée Triolle en 1986

Nacieco franca

Verkoj kaj aliaj [Montri]

Renée Triolle estas franca esperantistino. Ŝi estis la unua sekretario kaj poste prezidanto de Junulara Esperantista Franca Organizo, oficinta inter la jaroj 1969 kaj 1973.

Poste ŝi aktivis en Unuiĝo Franca por Esperanto, kaj inter la jaroj 1983 kaj 2004 estis komitatano A kaj komitatano C de UEA nome de la franca organizaĵo. En la Estraro de UEA 1995-1998 ŝi membris kiel vicprezidanto.

Dum pluraj jaroj ŝi krome aparte aktivis en Eŭropa Esperanto-Unio.

Verkoj

3 nivela perkoresponde kurso de UFE, 1980.

"Nouveau cours d'espéranto" (libro kaj kasedo), de Renée Triolle kaj Edmond Ludwig, unua eldono: 1986, Madrido; lasta eldono: 2005, Parizo.

"Esperanto Express", de Renée Triolle, Januaro 2006, Edition du Dauphin ([ISBN 2716313105](#)).

En 2009 ŝi kun Jean-Louis Texier krome verkis surbaze de la Germanlingvio sukcesa lingvogvidilo *Esperanto Wort für Wort* de Klaus Dahmann kaj Thomas Pusch la francan adaptigon. Ĝi eldoniĝis je titolo "L'Espéranto de poche, Guide de conversation", eldonejo *Assimil* ([ISBN 2700503996](#)).



Renée Triolle estas la kunaŭtoro de "L'espéranto de poche", unu el la pli malgrandaj lingva vojaĝgvidiloj de Assimil eldonejoj.

Renée Triolle est le coauteur de "L'espéranto de poche", l'un des petits guides linguistiques de voyage des éditions Assimil. (Photo G.L.)

Al la Francoj, la vorto "Nordo" ne plaĉas, kaj el tio suferis kaj daŭre suferas Norda Francio, eĉ se ĝi situas pli sude ol Londono aŭ Sankt-Peterburgo! Kantisto kantis, ke Norduloj "havas en la koro la sunon, kiu forestas ekstere "kaj feliĉe humura filmo famigis ilin. Tiu filmo "Bienvenue chez les Ch'tis" (Bonvenon ĉe la Norduloj) rakontas la koŝmaron de franca ŝtatoficisto, kiu ricevas postenon en la nordo, kaj malkovras, ke la tieuloj estas gastemaj, afablaj, agrablaj. **Kiel instruisto de rusa lingvo, mi havis la saman itineron: unua posteno estis apud Lille, en Tourcoing., kaj mi same konstatis, ke la regiono pli allogas ol supozite.**

Geografio klarigas historion

Ducent milionojn da jaroj antaŭe ekstaris montetoj Ardenoj, sekve troviĝos karbo. Meze de la terciara erao disfalis la tero, kaj venis maro (urbo Dunkerque estus sub la nivelo de la maro en la sepa jarcento!).

La regiono estas tre ebena (la plej "alta" monteto estas 176 metrojn alta!), ĝi sekve estis dum la historio facila trapasejo kaj diversaj popoloj kaj imperioj kaptis ĝin: Graflando Flandrio, Franclando, Burgonio, Sankta Romia-Germana Imperio, Hispanio, Nederlando, ĝis ĝi eniros Francion en 1792.

Pendolante inter diversaj imperioj, la regiono iĝis batalkampo.

Mi citas nur la ĉefajn batalojn, kiujn lernejoj el mia generacio bone konis: Julio Cezaro vizitas sian imperion kaj Bavay /Bave'/ en 57 antaŭ nia erao.

Apud Lille, en Bouvines /Buvin'/ la franca reĝo Philippe Auguste venkas la germanan imperiestron en 1214. Calais/Kale', Kalezon sieĝas la angla reĝo Edvardo la VIII-a dum pli ol ok monatoj, kaj en 1346 estis batalo en Crécy /Kresi'/.

En 1482, traktato de Arras donas al la franca reĝo Ludoviko la XI-a tiun regionon, kiu apartenis al la potencaj dukoj de Burgonio.

En 1520 la franca reĝo Francisko la 1-a provis konvinki la britan Henrikon la VIII-an ne alianciĝi kun Hispanio. Ili kampas vid-al-vide en la poste nomata "Kampo de la Ora Teksaĵo" pro la riĉeco de la tendoj.

En 1537 la armeo de la hispana Karlo la Kvina sieĝas la fortikajon de Montreuil.

En 1557, en Saint-Quentin/Sankta Kanteno/ la Francoj batas la Hispanojn; la franca reĝo Filipo la II-a (verŝajne estas Hispana reĝo) vetas sekve de kio estos konstruita apud Madrido la Palaco Escorial

En 1559 estas subskribita inter Francio kaj Hispanio la traktato de Cateau-Cambresis / Kato-Kambrezi/ kiu finas la t.n militojn de Italio kaj donas al Francio tri episkopejojn.

En 1643 nova milito kontraŭ la Hispanoj, fama batalo de Rocroi/Rokrua/, kie famiĝas 21-jara generalo, Condé /konde/, kiu poste estos nomita "La granda".

Necesos atendi ĝis la Franca Revolucio por ke venka fama batalo apud muelejo de Valmy /valmi/ en 1792 aligu la regionon al Francio. Napoleono instaliĝas kun sia Granda Armeo kun la intenco ataki Briton.

Post 150 jaroj da paco, eksplodis la unua mondmilito en 1914, kaj tie denove oni batalas: ĉie enestas tombejoj de soldatoj, entombigitaj laŭ la landoj (francoj, britoj, turkoj, kanadanoj, germanoj, aŭstralianoj, sud-afrikanoj ktp); sekvas nova invado komence de la dua mondmilito en 1940 kun pluraj bataloj (inter ili, detruo de Dunkerque dum la armeo estas blokita ĉe la maro).

Tero de migrado kaj migrintoj

La historio klarigas, ke la homoj devis adaptiĝi al alia regno depende de la vento de la historio.

Lingve la regiono parolis flandre, variaĵo de la nederlanda lingvo. Nun eĉ se ni memoras, ke ĝi estis iama Flandrujo, neniuj parolas la flandran lingvon, kiu estas instruita nur en unu mezgrada lernejo! Sed la popola franca lingvo daŭre enhavas trajtojn de tiu antaŭa lingvo.

Sed kiam komenciĝis la "industria revolucio" en la XIX-a jarcento, migris al norda Francio poloj kaj italoj por labori en la karbominejoj.

La homoj estis loĝataj de la entreprenoj en minejaj vilaĝoj kun samtipaj domoj ĉirkaŭ komuna korto, kio kreis familiecan etoson. Ĉiuj etnaj grupoj de migrintoj kreis kulturajn centrojn kaj provis konservi siajn kulturojn (ekz. en Stella-Plaĝo apud Le Touquet /l'tuke/, kie ĉiujare okazas Esperanto lingvo-staĝo, estis konstruitaj de la poloj feriejo kaj katolika preĝejo).

Aldoniĝas metalurgio, unue borde de la multnombraj kanaloj, kiu ankaŭ bezonas multajn laboristojn.

Kiam Napoleono decidis pri ekonomia blokado de Britio komence de la XIX-a jarcento, teksaĵo, kiu jam ekzistis, kreskegis ĉirkaŭ Lille (en Roubaix kaj Tourcoing Rubé' kaj Turkŭen'); tio ankaŭ uzas multajn "manojn". Naskiĝis tre fortaj entreprenoj, kiuj pioniras en perkoresponda vendado.

Bedaŭrinde dum la lastaj 40 jaroj malaperis kaj mineja ekspluatado (tro kosta elterigo de karbo) kaj teksindustrio kaj metalurgio pro konkurenco de Aziaj landoj, kaj perkoresponda vendado pro konkurenco de la reto.

Sekve la regiono iĝas kompleta senlaborejo kun amaso da senlaboruloj kaj malriĉuloj. Malgraŭ instalado ekz. de japana aŭtokonstruejo Toyota en Valenciennes. Tio eble klarigas la sukceson de la "Nacia Fronto", ekstremdekstra partio, kiu propagandas forigon de fremduloj kaj migrantoj.

Feliĉe restas agrikulturo, kiu ĉefe grandskale kultivas cerealojn, terpomojn aŭ sukerbetojn (esperantistoj eble legis la libron verkitan de Claude Longue-Épée, iama estro de sukerfabriko, eldonitan de TAKE). Originala estas la kreado apud Saint-Omer de surakvaj kampoj (3000 hektaroj) en la marĉo, atingeblaj per 300 km da kanaletoj.

Kruciĝo de kulturoj

Ne hazarde, la Unua Universala Kongreso de Esperanto okazis en Bulonjo ĉe Maro en 1905. Facile atingebla de Britoj, Belgoj, Germanoj, ĝi ankaŭ estis alloga por pliorienteŭropanoj kaj tiam Esperanto-movado kaj franca skolo estis tre fortaj.

Venu al norda Francio kaj vi povos viziti restaĵojn, monumentojn aŭ urbojn el diversaj epokoj.

Romiaj ruinaĵoj estas videblaj en Bavay.

Fortikaĵoj laŭ la stelformo komencita de Vauban, nun en la Monda Heredaĵo de UNESKO: Rocroi.

Mezepokaj urboj: Lille, Douai, Arras, Saint-Quentin, Valenciennes (la "Norda Ateno") kun aparta stilo: centra kvadrata placo, kun belfrido (sonorilturo por averti ĉefe pri incendioj) kaj mallarĝaj domoj, keloj.

Belegaj preĝejoj: multaj estas "mondaj heredaĵoj de UNESKO, plej ofte konstruitaj laŭ gotika aŭ baroka stiloj.

Batalkampoj kun mortintoj dum la unua mondmilito, ofte kun preĝejeto konstruita de la gepatroj de 21-jara leŭtenanto! Vimy estas posedo de Kanado kaj ŝafoj zorgas pri la bela aspekto de la herbejoj!

Muzeoj: plej novas filio de la Muzeo pri Moderna Arto Pompidou, instalita en Lens/lans/; Hospice comtesse en Lille kun kahelaj blumentritaj muroj, mineja muzeo.

Pejzaĝoj estas ankaŭ agrablaj, ĉiam mildaj kaj koloraj: oriente en Ardenoj kun montetoj, okcidente maro kun klifoj Blankanaza kabo el kreto (134 m) kaj Nigranaza kabo (el grejso, 45m), sablaj strandoj, kiel en Le Touquet, kiun famigis la Britoj jam en la XIX-a jarcento, birdorezervejo en tre ebena golfeto ĉe almariĝo de rivero Somme ktp. Eĉ la verdiĝantaj karborub-montetoj donas apartan aspekton al la pejzaĝo.

Lille, kie ni kongresos, ricevis sian nomon el "marĉo", "insulo" sendepende de la lingvo (L'isle, Rysel, Ryesel, Ter Yssel laŭ la epokoj).

Fondita en 640, ĝi grandiĝis dum Mezepoko kiel komerca renkontiĝejo: daŭre estas organizita ek de la XII-a jarcento la unuan semajnfino de septembro la plej **granda pulbazaro**; originala estas la internacia **festivalo de supoj**.

Ĝi estas la centro de la unua kunurbaro, ĉar ofte iuflanke de la strato aŭ en iu domo vi estas en iu urbo; sur la alia flanko de la strato aŭ en la apuda domo, vi jam troviĝas en alia urbo. Sekve multaj servoj devas esti komunaj kaj tiel naskiĝis la ideo de kunurbaro.

Lille estis Eŭropa Kultura Urbo en 2004 kaj verŝajne ĝi estas la sola, kiu profitis la okazon por instali longdaŭran kulturen politikon.

Muziko por ĉiuj estas alia moto en Lille. Orkestrestro proponas al infanoj de malaltaj socitavoloj ludi klasikan muzikon, ĉar beleco estas por ĉiuj.

Tute proksime de la "landolimo" kun Belgio, ĝi estas nun grava ekonomia, kultura, universitata centro.

Do venu al la 100-a Universala Kongreso en Lille: rapida trajno portos vin al Parizo, Bruselo, Nederlando aŭ Germanio, kaj vi povos vojaĝi laŭ la spuroj de niaj praesperantistoj.